Mi sendas la fotokopian de la pasport-paĝo kun foto <input type="checkbox"/>	

Kondiĉoj:

La kotizoj enhavas nenian asekuron kaj ne inkluzivas ekskurson. Via aliĝo ekvalidas, kiam LKK ricevas la plenan aliĝkotizon kaj plenigitan aliĝilon. La aliĝperiodo estas kalkulata laŭ la sendodato de la kotizo. Por kalkuli la kotizon validas via aĝo la 31-an de julio 2005. Se vi bezonas invititeiron, vi devas krompagi 10 eŭrojn. La kotizo estas transdonemebla al aliaj personoj sed ne redonebla. Se vi havas problemon pri antaŭpago, vi devas informi nin pri tio laŭ la retadreso: ijk@tejo.org


Mi konsentas kun la prezentitaj kondiĉoj kaj aliĝas al IJK-2005
subskribo: _____
Antaŭpagon sendu al UEA-konto: ijk-b-b (kun indiko IJK-2005)

Adreso:

pošta adreso de LKK:
61 IJK, Ireneusz Bobrzak
ul. Toruńska 82 m 133
PL-03-226 Warszawa
Pollando

generala retadreso de LKK: ijk@tejo.org
Por specifaj celoj bonvolu uzi jenajn retadresojn:
aliĝilo - ijk.aliĝhilo@tejo.org
programkontribuantoj - ijk.programo@tejo.org
invititeeroj por havi vizon - ijk.vizo@tejo.org

POLANDO



OCNECO

DIVERSECO

31.07-7.08.2005 Zakopane

**Nome de TEJO, PEJ kaj la klubo Varsovia Vento ni invitas vin al Pollando
por partoprehi la 61-an Internacionan Junularan Kongreson**

en Zakopane!

LOKO. Zakopane – Tatry-montaro, rokoj en verda arbaro, nekredelblaj vidindajoj

kaj multaj aliaj allogaĵoj. Unika loka arkitekturo, folkloro, bonega biero, pura akvo kaj aero, lokaj ŝafaj kaj kapraj fromaĝoj, ŝafajo kaj aliaj eblaj bonguste mangi. Riĉa infrastrukturo de kafejoj, bieroj kaj vendejoj... Foresto de kuoj!

Ĝuste tial ni renkontigos nek en Varsovio, nek en Krakovo, nek en Białystoko, sed en Zakopane situanta en la centro de Mezeŭropo, ĉe la slovaka landlimo, proksime de Ĉehio, Hungario, Rumanio kaj Aŭstrio, relative proksime de Litovio, Ukrainio kaj Germanio.

PROGRAMO. La temo de IJK "Unueco en diverseco" koncernas egalrajtecon, tial ni proponas interalie lingvan festivalon por prezenti riĉon de eŭropaj (kaj ne nur) lingvoj. Krome aperos temoj pri komunikiloj de blindaj kaj surdaj homoj, kio tu tas egalrajtecon de handikapuloj. Sed tio ne estas ĉio.

Per diskutgrupoj, prelegoj kaj aliaj programeroj ni volus diversforme prezentilăueble multajn aspektojn de egalrajteco!

Post seriozaj debatoj oni devas re-laksi :) Kiamaniere? Ni planas organizi ĉiutagajn ekskursojn al montaro. Al tiuj, kiuj restos en la kongresejo, ni proponos interalie diversnivelajn kursojn de Esperanto kaj de la pola, instruadon de polaj popoldancoj kaj partoprenon en elfarado de montara fromaĝo el ŝafa lakto. Vi neniam forgesos ĝian guston kaj odoron :) Ĉu vi iam revis pri kariero de filmastelulo aŭ reĝisoro? Se jes, tiam dum IJK vi povos plenumi tiujn revojn!

Por vespera programo ni antauvidas koncertojn kaj teatraĵojn. Nokte okazos karaokeo kun E-muziko, diskoteko, film-prezentadoj ktp.

Krome, kompreneble, eblos babili kun aliaj gesamideanoj, drinki kaj trinki... Proksime de Zakopane troviĝas Krakovo, iama ĉefurbo de Pollando, rezidejo de polaj reĝoj kun mezepoka kaj renesanca arkitekturo. Estas ankaŭ Wieliczka (Vielicka), unu el la plej malnovaj salminejoj en Eŭropo, kie oni povas promeni laŭ fascinaj koridoroj, viziti subteran kapelon el salo kaj sperti, kiel dum jarcentoj laboris la salministroj. Ambaŭ lokoj estos viziteblaj.

ALVETURO. Plej facile estas veni al Zakopane el Krakovo. Inter la du urboj veturas ĉirkaŭ 60 busoj kaj trainoj tagje. La busa vojaĝo daŭras ĉ. 2 horojn. Dum pli malpli 2 horoj vi atingos Zakopane ankaŭ el la slovaka urbo Poprad. En Krakovo kaj en Poljrad funkcias internaciaj flughavenoj. Se vi planas veni al Zakopane el UK en Vilno, uzu trajnon el la litova ĉefurbo al Varsovio. El Varsovio eblas veturi per trajno aŭ buso rektele al Zakopane. Se suffiĉe multaj homoj emos vojaĝi laŭ tiu vojo, ni organizos komunan buson de UK al IJK.

KOTIZOJ (en eŭroj)	Ago	A	B	C
< 20	25	20	10	
20-27	35	30	15	
27+	65	55	35	

Landkategorioj:

A: EU-landoj (sen la novaligintaj kaj Grekio), Japanio, Kanado, Monako, Norvegio,

San Marino, Svislando, Vatikano, Usongo.

B: Andorio, Ĉehio, Estonio, Grekio, Hungario, Kroatio, Malto, Latvio, Litovio, Pollando,

Slovakio, Slovenio.

C: ĉiuj aliaj landoj

Kotizvarioj:

Rabato: se vi aliĝos antaŭ la 3-a de januaro 2005, vi ricevos rabaton de **10 eŭroj**.

Malrabato: se vi aliĝos post la 1-a de majo 2005 aŭ surloke,
vi pagos **15 eŭrojn** pli ol en la tabelo.

Surloka malrabato: se vi ne estas membro (aŭ patrono) de TEJO aŭ PEJ,
vi krompagas **30 eŭrojn**.

Loĝkostoj por semajno:

- lito en junulargastejo (3-5 personaj ĉambroj) **35 eŭroj**
- ita matraco en amasloĝeo (15-personaj ĉambroj) **25 eŭroj**

- planko en amasloĝeo

- 1- aŭ 2- litaj ĉambroj en lokaj pensionoj **15 eŭroj***

* Prezoj laŭ la nombro de volontuloj, mendoj nur ĝis 1-a de februaro 2005.

Ĉuj tranoktejoj estas atingeblaj per maksimume 5-minuta piediro de la kongresejo.



Manĝado:

35 eŭroj, la prezo inkluzivas tri manĝojn tage de lundo ĝis sabato kaj krome vespermangon la alveran dimancon kaj matenmangon la foriran dimancon.

Antaŭpago: **20 eŭroj** por A- kaj B-landanoj
10 eŭroj por C-landanoj

Zakopane – centro de la urbeto

1. Kongresejo
2. Junularastejo
3. Anasloĝeo
4. Pensionoj
5. Stacidomo
6. Bushaltejo



UK –> IJK –> JS... Nekredeble, ĉu? Post IJK vi bezonas nur momenton por translokiĝi al Hungario kaj partopreni JS-on. Pripensu tion, ĉar ne ofte estas somero, kiam esperantistaj aranĝoj tiom proksimas geografie kaj laŭ dato!

www.tejo.org/IJK
Prefere uzu la alिजion en nia TTT-paĝo kaj konsultu regule la paĝon
por pli frisej informoj.

www.republika.pl/viavento

Agado de LKK kaj aktualaj fotoj pri preparoj por 61a IJK
troveblas ĉe la klubo paĝo de Varsovia Vento.

Bon de commande

Libellé	prix unitaire	quantité	prix
<i>Frais d'emballage et d'expédition : 20% du prix jusqu'à 40€, 10€ au delà (minimum 2€) :</i>			
	Montant total :		

Bulletin d'adhésion

les tarifs en euros...	moins de 30 ans		plus de 30 ans	
	normal	étudiant	normal	étudiant
>Adhésion à Espéranto-Jeunes (JEFO)	<input type="checkbox"/> 30	<input type="checkbox"/> 15	<input type="checkbox"/> 30	<input type="checkbox"/> 15
<i>c'est votre première adhésion ?</i>	seulement <input type="checkbox"/> 10 € !			
<i>Suppléments pour adhérer à Espéranto-France (UFE)</i>	<input type="checkbox"/> 25	<input type="checkbox"/> 20	<input type="checkbox"/> 55	<input type="checkbox"/> 35
• abonné au « Monde de l'espéranto » (6/an) et au calendrier « Okazas » (12/an)		<input type="checkbox"/> 33	<input type="checkbox"/> 20	
• non abonné			<input type="checkbox"/> 22	
<i>>Association mondiale d'espéranto (UEA)</i>	<input type="checkbox"/> 22		<input type="checkbox"/> 54	
• annuaire des délégués « Jarlibro » (1/an)				<input type="checkbox"/> 54
• annuaire Jarlibro et revue Espéranto	<input type="checkbox"/> 54			
<i>>Association mondiale des jeunes (TEJO)</i>				<input type="checkbox"/> 60
• revue Tutmonde (4/an)		<i>gratuit pour les membres d'UEA</i>		

JEFO - Espéranto-Jeunes :
Organisation française des jeunes espérantophones ; affiliée à **UFE** : Union Française pour l'Espéranto

TEJO :
Organisation mondiale des jeunes espérantophones ; affiliée à **UEA** : Association Mondiale d'Espéranto

à payer...	
<i>total bon de commande :</i>	
<i>total des cases cochées :</i>	
<i>don supplémentaire :</i>	
Total :	

Comment adhérer ?

Si vous avez accès à Internet,
merci de ne pas remplir ce bulletin papier !
rendez-vous directement sur

www.esperanto-jeunes.org/adherer

Vous gagnerez du temps, notre travail de gestion sera facilité, votre adhésion sera prise en compte plus rapidement... et si vous choisissez de payer par virement, vous pourrez même faire l'économie d'un timbre... et d'un temps précieux !

Sinon, remplissez lisiblement ce bulletin, joignez votre chèque à l'ordre d'*Espéranto-France*, et adressez le tout à :

Espéranto-Jeunes
4 bis rue de la Cerisaie
75004 Paris

Merci !

En cochant les cases ci-dessus à droite, l'information correspondante **ne figurera pas dans l'Annuaire des Membres** (accessible seulement aux autres membres). **Si vous souhaitez ne pas y figurer du tout, cochez ici** . Sinon, vos nom, prénom, âge et ville y figureront... **Grâce à ce nouvel Annuaire des Membres, nous pourrons mieux nous connaître !** Par ailleurs, tous les éléments indiqués dans ce bulletin sont destinés à Espéranto-Jeunes. Nous pouvons les transmettre à d'autres associations espérantophones, ou vous envoyer des infos concernant Espéranto-Jeunes via internet. **Si vous ne le souhaitez pas, cochez ici** . Bien entendu, vous disposez d'un droit d'accès, de modification, de rectification et de suppression des données qui vous concernent (art. 34 de la loi « Informatique et Libertés »). Pour l'exercer, adressez-vous à *Espéranto-Jeunes*.

<i>nom :</i>	
<i>prénom :</i>	
<i>adresse :</i>	<input type="checkbox"/>
<i>code postal, ville :</i>	
<i>pays :</i>	
<i>téléphone fixe :</i>	<input type="checkbox"/>
<i>téléphone mobile :</i>	<input type="checkbox"/>
<i>fax :</i>	<input type="checkbox"/>
<i>courriel :</i>	<input type="checkbox"/>
<i>date de naissance :</i>	
<i>signature :</i>	

Intervjuo de la redaktoroj de "La Amikeco"

Antaŭ kelkaj monatoj, mi ricevis mesaĝon de esperantistino kiu laŭdis novan retejon kaj instigis min tuj viziti ĝin. Kelkajn musklakojn poste, mi ektrovis retgazeton nomitan "la Amikeco". Ĝia beleco kaj bunteco tuj impresis min. La Amikeco estas redaktata de pluraj aktivuloj el diversaj landoj de Azio (Ĉinio, Koreo, Vjetnamio kaj Japanio) kaj eĉ, jam de nelonge, el Francio. Kiel videblas, "la Amikeco" ne nur buntas pro sia aspekto sed ankaŭ pro sia enhavo! Kiuj estas tiuj junuloj, kiuj taksas la amikecon tiel alte? Kelkaj el ili respondis al miaj demandoj...

Respondoj transskribitaj de Christophe Chazarein

JI : Saluton al vi! Komence, ĉu vi bonvolas prezenti vin?

Nubo : Mi estas Lim Sung-woo el Koreio. Ĉirkaŭaj esperantistoj kutime nomis min Nubo. Dum universitato mi speciale studis pri desegnado kaj dezajnado. Nun laboras en kompanio asekura pri aŭtomobilo, tie mi administras interretan hejmpaĝon por klientoj. Kaj kompreneble unu el la redaktoroj de La Amikeco.

Xin : Saluton! Mia nomo estas ZHU Xin. Antaŭ tri jaroj, mi hazarde konatiĝis kun Esperanto, kaj partoprenis en senpaga interreta koresponda kurso de Esperanto. Dume, mi pli kaj pli interesigis pri Esperanto. Mia hobio estas turismo kaj legado.

Esperana : Saluton geamikoj. Mi estas Kwon Sun-hee, loĝas en cefurbo Seoul en Suda Koreio. Mi ŝatas vojaĝi biciklante. Unue mi eklernis Esperanton tiucele por diskoniti pri tradicia muzikajo de Koreio. (Mi estas membro de Espera-Mondo, tradicia muzika grupo de Suda Koreio.) Sed, lernante Esperanton mi ekhavis multajn spertojn en Esperanta mondo. Kaj nun mi volegas amuzigi kun bonaj geamikoj per Esperanto. Mi volas renkontigi kun geesperantistoj el ĉiuj landoj. Lastatempe mi volas eteran liberan vivon.

JI : Kiel renkontigis la redaktoroj de "la Amikeco"?

Nubo : En la jaro 2003 vintre okazis en Hanojo, Vjetnamio la renkontiĝo de E-junularo inter Vjetnamio, Japanio kaj Koreio. Tie ni renkontigis unuafoje.

Xin : Do, mi konatiĝis kun aliaj redaktoroj de La Amikeco per interreto. Kaj ĝis nun, mi fizike renkontigis nur kun du el ili, nome Esperana kaj Nga. Mi komencis kunlabori kun aliaj ekde la 3-a

numero. Mi unue aŭdis pri La Amikeco de Esperana. Mi konatiĝis kun ŝi dum Komuna Seminario okazinta en urbo Janĝi de ĉinio en la jaro 2003. Ŝi rekomendis al mi La Amikecon. Kaj mi tuj ekinteresigis pri ĝi, kaj deziris partopreni en redaktado de ĝi.

Esperana : Jam mi fartis laborante kun Nubo en FAROS (korea junulara kunveno) de Esperanto. Mi konatiĝis kun Zhu Xin ĉe KS (Komuna Seminario en Jenĝii de Ĉinio, 2003). Ĉe novjaro de 2004 mi ekaŭdis de Nubo pri La Amikeco, tiamekscitiĝis pro la nova aktivado. Kaj poste mi konatiĝis kun redaktoroj de aliaj landaj per interreto aŭ fizika renkontiĝo.

Laurent Dommée : Kiam mi memlernis esperanton per la ttt-ejo Lernu!, mi decidis trovi korespondantojn por plibonigi mian lingvivelon. Mi uzis la portalan membriston kaj sendis retmesaĝojn al multaj lernantoj. Kaj hazarde mi ekbabilis kun Nigra okulo (ZHU Xin). Post kelkaj semajnoj li parolis pri la projekto "La Amikeco" kaj donis al mi la retadreson de la gazeto. Mi trovis ĝin tre bela kaj tre multinteresa unue ĉar mi multinteresiĝas pri azia kulturo kaj due ĉar la redaktoroj de la gazeto estas de malsamaj aziaj landoj kaj ili prezentas siajn kulturojn, siajn vivojn en aliaj propraj landoj.

Ĉar mi pensis ke tiu gazeto estus taŭga por prezentri kaj interŝanĝi inter aliaj kulturoj, mi tuj proponis partopreni al redakcio de la gazeto. Feliĉe la redaktoroj akceptis min kiel unuan eksterazian redaktoron.

JI : Kiam unue aperis al vi la ideo krei retgazeton?

Nubo : Post komenco de la 21-a jarcento malfortiĝis movado de junularo en Koreio. Eble tio ŝajnis ne adaptiĝi al nuntempa medio jam ŝangiginta. Oni opiniis, ke rekta kaŭzo estus pro interreto, tra kiu junuloj povas gajni tutinformojn senpage, ekzemple



Rekomendu La Amikeco-n

filmojn, muzikojn, verkaĵojn, ludojn ktp. Sed multaj sciis, ke la interreto estas bona ŝanco fortigi nian movadon. Precipe inter aziaj landoj la distanco malproksimas kaj estas intermetita maro. Sekve eĉ interrenkonti estas malfacila. Tamen tra interreto ni facile povas amikiĝi. Plue, se ni kune laboros havante iun komunan celon, reciproke ni povos kuraĝigi kaj instigi. Tiel mi pensas. Do, mi proponis krei la retgazeton en Hanojo. Kaj ĉiuj konsentis. Tiel mia retgazeto naskiĝis.

JI : Kial vi nomis ĝin "la Amikeco"?

Nubo : Komence ni multe cerbumis pri nomo modera. Vere ni deziras trovi bonan nomon, ĉar simbolo estas nia vizaĝo. Unu el ni, Vuong Quoc Cuong, li nomis tre ege bonan nomon.

Xin : Mi esperas, ke ĝi estos amikiga ponto inter homoj el diversaj kulturoj.

JI : Via retgazeto imponas pro sia beleco. Ĝi aspektas kvazaŭ profesia ! ĉu vi povas klarigi kial ?

Nubo : ;) Mia fako estas dezajnado. Nuntempe mi amas mian laborojn en laborejo, ĉar mi serĉis feliĉon de vivo. Tra laboro mi lernas dezajnon, teknikon, merkatumon, manierojn solvi problemojn kaj novajn elpensajojn. Lernante kaj spertante ilin, mi kaj kunuloj pensas koneksecon kun La Amikeco aŭ nia movado. Kaptinte koneksajojn ni provas, esprimas ilin tie kun kunuloj.

Xin : La Amikeco interesigas pri preskaŭ ĉiuj temoj, seriozaj, neseriozaj, amuzaj, pikaj, ktp. La temoj unue devas esti interesaj kaj montrantaj "amikecon".

JI : Kiel aranĝigas la kunlaborado inter la redaktoroj?

Nubo : unuvorte, interreto, per kiu ni libere, ĉiam renkontas kaj interŝanĝas opiniojn kaj kunlaboras.

Xin : Ĝenerale, ni unue difinas ĉeftemon de la venonta numero post dissendado de la lasta numero. Poste ni ĉiuj kolektas artikolojn el respektivaj landoj laŭ la ĉeftemo.

ankoraŭ ne estas tre alta. Sed ni kiel eble plej pene redaktas la retgazeton.

JI : Jam aperis 9 numeroj de la retgazeto kaj la 10a estas preparata. Ĉu vi bonvolas priparoli la venontan numeron ?

Nubo : Nia ĉefredaktoro Zhu Xin detale klarigos. Ĉu estas prave, Xin?

Xin : Jes. Kiel en antaŭaj numeroj, ni aranĝos la ĝeneralajn rubrikojn, ekz. sinprezenton, recepton de mangajoj, lenson, ktp. Krome, ni difinis "novjaron" kiel ĉeftemon de la 10-a numero. Kvankam la novjaro pasis jam antaŭ monato. Sed la alia novjaro ankoraŭ venos, nome la novjaro laŭ luna kalendaro. Ĝi estas festata en Ĉinio, Koreio, Vjetnamio kaj iuj aliaj aziaj landoj. Ĝi eĉ pli gravas ol la jus pasinta "novjaro" en iuj landoj. Mi kredas, ke ankaŭ la 10-a numero estos interesa, kaj enhavoplena¹.

JI : Kion vi antaŭvidas pri la estonteco de "la Amikeco"? Kiaj estas viaj projektoj?

Nubo : Ni esperas, ke La Amikeco fariĝu la spaco kiu enhavas multajn kulturojn, opiniojn, informojn por junularo tutmonda. Tamen por sukcesi niajn projektojn, ni devas akcepti diversajn opiniojn kaj kunlabori kun multaj junuloj kaj serĉi kaj provi manierojn, kiuj estas ekzemple filmoj, muzikoj, bildoj, sportoj, ludiloj ktp.

Xin : Nu, mi unue esperas, ke La Amikeco daŭros, kaj ĝia kvalito altiĝos, kaj ke pli multe da aktivuloj aliĝis al ni por redakti la retgazeton. Verdire ni havas multajn esperojn pri La Amikeco, tamen ni devas ellabori konkretajn projektojn nur laŭ ĝia antaŭenpaŝado.



Feliĉe, sekve de tio iom multaj talenthavantoj helpas nin kaj nian movadon. Do, ŝajnas, ke la beleco tiel fariĝas.

Xin : Ni devas ŝuldi la belecon al Nubo, kaj liaj amikoj, kiuj desegnis por La Amikeco. Ili kontribuis multege al La Amikeco. Sen ilia laboro, La Amikeco estus tute alia.

JI : Pri kiaj temoj interesigas "La Amikeco" ?

Nubo : Eble mi pensas, ke ni ĉiuj havas malsamajn interesojn. ĉiuj havas fortecaĵn karakterojn kaj diversajn interesigojn. Do, vidpunktoj pri La Amikeco eble malsamas. Laŭ mi La Amikeco estus granda ujo havanta diversajn kolorojn de nuntempaj gejunuloj. Interalie mi deziras fari, esprimi, enmeti artojn kaj kulturojn por junuloj.

JI : Kiom da vizitantoj trafas "la Amikecon" kaj el kiuj landoj ili plejofte estas ?

Nubo : Kiam ni dissendis numeron 9an, tiam 1608 legantoj ricevis nian gazeton. Eble venontnumere eble nombrigas ĉirkaŭ 1700 el tutmondo.

JI : Kiel kutime reagas tiuj vizitantoj ?

Nubo : Dissendinte, ni ricevadas vere multajn respondeojn kaj gratulmesaĝojn venas en leterujo. Plejmulte ili donacas aplaŭdon. Tamen kelkaj mencias erarojn aŭ problemojn, per kiuj La Amikeco pliboniĝas.

Xin : Mi havas kelkajn esperantisto-amikojn el diversaj landoj. Leginte La Amikecon, iuj esprimis laŭdon, kaj iuj kritikis niajn erarojn en la teksto. Mi devas konfesi, ke nia lingvonivel

¹ La 10a numero jam aperis antaŭ la preso de tiu ĉi artikolo. Ĝi efektive atingis la celon de 1700 legantoj ! Ĝi entenas interesajn kaj amuzajn artikolojn, kaj belegajn bildojn por ornami vian komputilon (ndlr).

Barato : lando de diverseco


Leena Athparia

Vi trovas vin en la mezo de kaosa strato. Dekstre, vaganta bovo promenas trankvile, dume bruaj veturiloj ĉirkaŭiras ĝin por eviti kolizion. Maldekstre, virino vestita en brila blua sario staras mezstrate, senmove, enkaptita pro la intermiksa amaso da homoj kaj veturiloj. Maldika patrino vin alproksimiĝas, petegante monon por nutri bebon kiu troviĝas, okulapertegaj, sur ŝia dorso. Intertempe, vi rimarkas supran reklamtalon, kiu reklamas venontan "Bollywood" filmon per bildo de feliĉa, ridetanta amparo antaŭ la kompatinda patrino apud ia aŭculo kun pafilo. En la strato, amaso da aŭtomobiloj, bicikloj, rikŝoj, homoj, bestoj kaj motorcikloj aldoniĝas al la kaoso de blekoj, krioj, hupbruoj kaj odoroj.

riĉeco da lingvoj


Ne, vi ne songas pri absurdajoj! Vi troviĝas en la vera kerno de la ĉiutaga vivo en Barato (Hindio); diversriĉa kaj kontrastplena lando. Lando de unu el la plej malnovaj kulturoj kaj civilizacioj en la mondo, Barato aĝas pli ol 5000 jarojn (eĉ se oficiale, la lando estis kreita en 1947). Oni trovas fortajn sociajn, religiajn kaj kulturajn identecojn, kiuj estas la kialoj ke ĉi-tiu lando ankoraŭ estas pli malpli nešanĝita malgraŭ multaj invadoj kaj eŭropkoloniismoj fare de la Angloj, Francoj, kaj Portugaloj. Multaj kamparaj vilaĝoj estas preskaŭ la samaj kiel antaŭ 1000 jaroj, sed tamen, Barato adaptiĝas al la nunaj modernajoj (ekzemple, per komputila teknologio, kaj per la kinoarto).

la fama Tajmahal



Kompreneble, en tia kulturdiversa lando, troviĝas riĉecego de lingvoj, komparebla kun la diverseco de lingvoj en Eŭropo. Entute, 18 lingvoj uzeblas oficiale, 24 lingvoj havas pli ol unu milionon da parolantoj, kaj oni parolas per 1652 malsamaj lingvoj kaj dialektoj tutlande (75% de la loĝantoj parolas lingvojn kiuj devenas el la Sanskrita). Evidente, tio ne facilas por la interkomprenejo kaj la registaraj aferoj, do la Hindia kaj la Angla estas elektitaj kiel plej uzataj lingvoj. Kvindek procentoj de la loĝantaro parolas Hindian (kiel unuan aŭ duan lingvon) kaj 11 % scikonas la anglan kiu estas lingvo de la juro kaj la burokrataro.

Bedaŭrinde, pro la koloniismo, la angla iĝis interplektita kun la socia rango. Riĉuloj sendas siajn infanojn al angololingvaj lernejoj kie ili ne lernas la regionan lingvon. Dum miaj vojaĝoj tie, ŝokis min ke multaj el ĉi-tiu junuloj ne kapablas skribi aŭ legi la regionan lingvon, kaj interesigas pli pri anglokulturaĵoj kiel filmoj, kantistoj, muzikistoj, vestmodo k.t.p. el la "revlanda Usono" (laŭ ili). Tamen, ili reprezentas nur frakcion de la loĝantaro kaj ne reprezentas ĉiun Baratanon.



Multaj homoj malinterkonsentas pri la anstataŭigo de la Angla per la Hindia kiel unua pontolingvo. Iuj diras, ke pro tio, ke Hindia ne estas la patrina lingvo de ĉiuj, la angla pli bonas ĉar ĝi metas ĉiun en la saman malavantaĝan

Opiniejo : Kio okazas en Tibeto?

Tifen

situacion. La Baratanoj bone spertas pri la problemo de malinterkompreniĝoj inter diversaj lingvoj. Pacema popolo, ili komprenas la gravecon de pontolingvo kaj multaj homoj ŝatas la ideon de Esperanto. Ekde la jaro 1906, Esperantaj kluboj ekzistas (unue en Mumbajo kaj Kalkato), kaj nun klubanoj renkontigas en multaj aliaj urboj (ekzemple Bangaloro, Tirupatio, Puneo, Hajderabado, Laknaŭo k.t.p.). Tamen, la angla ankoraŭ estas la plej grava pontlingvo, do la disvastigo ne tiom facilas. En tiu trologanthava lando, estas problemoj de senlaboreco kaj malsato kiujn nepros iam solvi, sed Esperanto povus esti ilo por helpi plibonigi tiujn problemojn dank'al la kunveno de cieaj volontlaboruloj.

Barato estas lando de kontrastegoj, malnovaĵoj kaj modernaĵoj, belegajoj kaj malbelajoj, riĉuloj kaj malriĉeguloj, kaosa sed ankaŭ trankvileca....kie ĉio miksiĝas porkreimirindan mikrokosmon, kies esenco estas pli granda ol la sumo de siaj partoj.

Tibeto estis perforte invadita fare de Ĉinio en 1949. De tiam, 1,2 milionoj da Tibetanoj mortis pro rektaj konsekvencoj de la invado. Ĝi estas officiale « aŭtonoma regiono » de Ĉinio;

La 10an de marto 1959, Tibetanoj ekstaris kontraŭ la nelaŭleĝa okupado de Tibeto fare de Ĉinio. La Dalaj Lama, politika kaj spirita ĉefo de Tibeto, forfuĝis Baraten, kie li estigis ekzilan estraron;

Ĉinio ekkoloniadis Tibeton. Estas nun pli da Ĉinoj en Lhasa (la tibeta ĉefurbo) ol da Tibetanoj;


Tibetaj virinoj prosuferas devigatajn malfertiligojn kaj abortigojn, kies celo estas nenigi la tibetan popolon. La virinoj estas bastonitaj, seksperfotigitaj, oni dissiras iliajn mampintojn, ensovas elektrajn klabojn en iliajn vaginojn kaj anusojn, envolas la korpojn per elektraj kabloj subtensiaj...

Estas nun ĉirkaŭ 250 politikaj malliberuloj, inter kiuj la Panĉen Lama, 14-jaraĝa, kiu jam pasigis la duonon de sia vivo en malliberejo. En malliberejoj aŭ laborkoncentrejoj, politikaj malliberuloj ofte prosuferas sangelprenojn, cerblavadojn, torturojn fizikajn kaj psikologiajn, « reeduuklasojn »

De kiam Ĉinio subskribis la Konvencion kontraŭ la torturo, en 1988, 84 Tibetanoj mortis pro torturoj.

En Lhasa nun troviĝas pli da malliberejoj ol da monahejoj. La tibeta ĉefurbo iĝis seksturismejo komparebla kun Bangkok;

Ĉirkaŭ 80% de la arbaroj estas razitaj de la Ĉinoj. En kelkaj regionoj estas tre granda



radioaktivo, kupro kaj kobalto estas ekelstelitaj, 10 akvobariloj estas konstruataj (detruo de la naturmedio, formovo de lokaj popoloj)

Religia libereco estas forte punata, ofte pli severe ol murdo. Nun pli ol 100 gemonaĥoj daŭre estus malliberaj. Monaĥoj, kiuj starigas tibetajn lernejojn por pluvivigi la tibetan kulturon, estas akuzataj pri terorismo.

Estas konstruata 1118-kilometra trajnlinio de Golmund (garnizonurbo en la Kighaj regiono, Ĉinio) ĝis Lhasa; ĝia konstrufino estas planita por 2007. La kosto de tiu linio estas 3,2 miliardoj da eŭroj, tri foje pli ol kiom elspezis la ĉina registraro por sano kaj edukado en Tibeto. Kiam la trajnlinio pretos, pli kaj pli multe da kupro estos ŝtelita. Tiuj fervojoj plirapidigas enmigradon de Han-popolo, kiel jam okazis en Mongolio kaj Manĉurio. Najbaroj de Ĉinio, kiel Barato, malkvietigas pro la militaj eblecoj, kiujn donus tiu trajnlinio; efektive, la fervojo povus utili por rapide plifortigi la ĉinan militistan ĉeston en Tibeto.

EKKONSCIU KAJ EKAGU!

fontoj:

Amnesty International

www.amnesty.org (kelklingva)

TTT-ejo de la ekzila registro :

www.tibet.org (tibeta-angla)www.tibet.fr (franca)www.freetibet.org (angla)www.eo.wikipedia.org/wiki/Tibeto (esperantlingva)

OTAKU - ekstremaj virtualemuloj

Ĉu danĝeraj kontraŭ-sociuloj?

Aleks Kadar

Otaku – Kial pri tio paroli?

Car la temo daŭre aktualas – ĉiam estos Otaku-oj, la fenomeno ne estas malaperanta, male: ĝi kreskas.

Car la vorto tre belas, kaj eĉ se ju pli kreskas la fenomeno, des malpli originalas la vorto, ĝi daŭre originalas.

Car, eĉ pli interese, en tiu vorto enestas miaj inicialoj (AK) :), Fine, ju pli mi pensas pri Otakismo en Esperanto, des pli mi konvinkiĝas, ke la fenomeno multe interagas kun Esperantumado !

Ci-artikole, mi do prezentos la devenon de la fenomeno, de la vorto, ĝiajn kaŭzojn, mi apartigos la diversajn tipojn de Otaku-oj, kaj fine, iom parolinte pri eventuala danĝereco de la afero, esploros la eksupozitajn ligojn inter ĝi kaj Esperanto.

Ota-Kiuj – El-Realeco-fugantoj

La koncepto «Otaku» naskiĝis en 1983 de la plumo de junia socia kritikisto, Akio NAKAMORI. En la japana,

la termino "Otaku" signifas aŭ la « domon, ejon, kie oni vivas, estas », aŭ korespondas al nepersona « vi-alparolo », kiun oni uzas por alparoli iun, kiun oni ne konas aŭ kiun oni ne plikonemas. Patro de ĉiuj Otaku-oj, Nakamori konsideras ilin kiel « la respegulo de la nuntempa japana socio ».

La Otaku-oj sentas sin bone nur ene de la virtuala mondo, kiun ili kreis por si. Dank'al novaj teknologioj, de nun eblas sperti la mondon sen eliri sian ĉambelon. Video-ludoj, komputiloj, modemoj, vidbendiloj, fotiloj nun apartenas al nemalhavebla ilaro de la Otaku-o, kio ajan estu lia pasio. La Otaku-oj komunikas pere de siaj komputiloj, de siaj komiksoj, de siaj kolektoj de alt-teknologiaj aĵoj, ofte forlasante amikojn kaj familiajn rilatojn ili mergiĝas en spektadon de mondo de bildoj kaj de artefaritajoj; en surper-amaskomunikita universo kaj pacmaniere ili batalas kontraŭ la mašinoj, kiujn ili ofte venkas, farigintaj majstroj pri la videoludoj, inventas malsimplajn komputilajn programojn, arigas la vidbendojn en siaj dorm-ĉambroj, preferante karesi la estulojn de la piksela galaksio ol siajn samaĝulinojn.

Ota-Kio?

La Otaku-ojn eblas dispartigi en diversaj kategorioj:

- Camera Kozo : unumaniaj fotademuloj, investas milojn da eŭroj por aĉeti la plej modernan fotilan materialon, kiu ebligas ilin senlace fotadi "Idolojn" dum koncertoj aŭ eventoj "events", kiujn ili ĉeestas;
- Okkake : sekventa fanatikulo de iu idolo;
- Military-mania : milit-emuloj;
- Manga : komikso;
- Cosplay : Costume play, transvestiĝo;
- Hikikomori = junuloj, kiuj restas en sia ĉambro, ne eliras ĝin dum jaroj;
- Kolektemuloj : temas ekzemple pri manga-oj, pupoj, garage-kit (modeloj de spac-ŝipoj ks), vidbendoj, DVD-oj, KD-romoj,

KD-oj, fotoj, ovoj, gazetoj... Egaj konsumadantoj, ili malsatece aĉetas ĉion, kio rilatas kun sia pasio. La Otaku-oj estas la plej grandaj konsumantoj de video-materialo, fotiloj, video-ludoj, vidbendoj aŭ ĉiaj revuoj. Ĉiujare, aŭguste kaj decembre, la "Comiket" (Comics Market) kunigas en 2 tagoj pli ol 500 000 junulojn el tuta Japanio. Templo de fanrevuoj (« dōjinshi ») : amatoraj komiksoj, mem-eldonitaj, vendiĝas tie por pli ol 25 milionoj da eŭroj en 3 tagoj, kio donas ideon pri la ekonomia graveco de tiu paralela kulturo.

Ota-Kial?

**La tri trooj je kiuj la
Otaku-oj estas la viktimoj
aŭ la herooj.**

- 1.EDUKADO : meritokrateca socio « Ijime », « Frapi la kapon de la elstara najlo »;
- 2.INFORMADO : troinformita kaj tentema socio;
- 3.KONSUMADA socio kaj ekonomia prospero;

Ĉu estas, krom Japanio, iu socio de nia moderna mondo, kiu same multe akcentis Edukadon, Informadon kaj Konsumadon? Nu, ĝuste tiuj 3 fundamentojn de la nuna japana socio la Otaku-oj alfrontas; ili estas la riveliloj de la japana socio en tiuj 3 kampoj kaj la stigmatoj; tamen, ne ili estas la malsanoj, sed estas la socio, kiu ilin naskis.

Estas idioma esprimo, konata de ĉiuj en Japanio, kiu signifas: « La elstaran najlon oni frapu ĝis kiam ĝi samniveliĝos kiel la aliaj » (france: « Le clou qui dépasse doit être martelé jusqu'à ce qu'il rentre dans le rang »). Tiu esprimo klare montras la japanan pensmaneron, kiu antaŭenigas la grupan intereson antaŭ tiun de la unuopulo, laŭ la principio: « Tio kio bonas al la grupo, bonos al la grupanoj ».

Vunditaj de la edukado – la grupo,



la socio -, ili fuĝas en fantazian mondon, estantaj plen-nutritaj de virtualaj bildoj montrataj de la modernaj amaskomunikiloj - TV, revuoj, komiksoj - sen apartigi sin de la konsumada socio, kiun ili parkere konas.

Socie neadaptitaj, ili nefidas la interhomajn rilatojn, preferante al kunesto de homoj la kunestadon pli kvietigan de herooj de komiksoj, animitaj filmoj aŭ de ne-atingebraj steluloj de la televideo.

Otaku - Ĉu danĝeraj?

En 1989, la fenomeno unuafoje akiris amaskomunikilan famon, pro la kapto de 27-jaraĝa junulo, kulpa je forrabto, seksperto kaj mortigo de 4 knabinoj. Oni retrovis en la ĉambro de tiu junulo kolektagon de pli ol 6000 video-kasedoj de animitaj filmoj, iuj enhavantaj « malpermesitajn » bildojn de sekspertoj aŭ de murdoj. Ĉe tiu juna senekvilibro, nekapabla malsamigi interfantasma kaj efektivigo, fikcio iris tro for. Tiu krima ago altiris konsciigón kaj grandan debaton en la japana socio.

Post-moderna socio, riĉa, la hodiaŭa Japanio serĉas sin, sen scii kion proponi al sia junularo. Naskiĝintaj en socio tro glata por toleri konfliktojn, objektive sen kialoj plendi pro la ekonomika prospero de la lando, la junaj japanoj ne scias, kiel esprimi sian malkontenton, sian ekzistecan malbonfarton. La Otaku-oj simbolas tiun malbonfarton, enfermiĝante en sia virtuala mondo.

Oni cetere notis suspektindajn rilatojn kun la Aum-sekto. Tamen laŭ mi plej ofte ne danĝeras la Otaku-oj, kiuj preferas enſlosiĝi en si mem, kaj havi malmulte da kontaktoj kun la ekstera mondo. La plej grandan danĝeron ili reprezentas por si mem, se konsideri ke necesas al plenĝoja

disolvado de homoj sociumi kaj rekte interrilati en la realeco.

Otaku - kaj Esperanto

Esperanto kiel unu ebla formo de Otakismo


Ankaŭ Esperanto povas esti konsiderata kiel unu el tiuj ŝatokupoj, en kiuj homoj droniĝas dum horoj, dum jaroj. Esperanto estas fakte riĉa mondo, Esperantumado konsistas ne nur el interretumado (tra Eoretapaĝaroj, babilado, lernado, ludado) sed ankaŭ el diversaj temporabaj aferoj : legado de libroj, revuoj, aŭskultado de muziko, resume, ĝuado de ĉio, kion la bunda Esperanto-kulturo ofertas.

Same kiel Otaku-oj, Esperantistoj ŝatas kolekti ĉion ajn rilatan al sia lingva pasio : gazetojn, naci-gazetajn artikolojn, retmesaĝojn, KD-jn, T-ĉemizojn, flagojn, skribilojn. Ĝenerale ĉiujn haveblajn Esperantajojn.

Same kiel la Hikikomori-oj, eblas al Esperantisto sin dediĉi al sia pasio sen eliri sian ĉambron. Unue lerni la lingvon interrete, per *ikurso aux lernu*, babilo rete ĉe *Gangalo*, legi la novajojn pri Esperantio ĉe *Gangalo*, *Libera Folio*, legi la retmesaĝojn ĉe cento da diskutlistoj, partopreni senfinajn debatojn pri ekzemple: indeco simpligi la lingvon, forigi la ĉapelitajn literojn, la ita/ata polemikon, ĉu eblas ci-paroli, ĉu la lingvo estas seksista. Multaj interesegaj temoj, pri kiuj plej multaj homoj bedaŭrinde neniam ekscios.

Same kiel la Camera Kozo, la fotemaj Esperantistoj povas partopreni Esperanto-renkontigojn, kie eblas al ili fotadi dekojn da ĉarmaj junulinoj.

De nelonge eĉ ekzistas komiksa revuo, kiuebligas revipri Esperanto versio de la manga-oj. Fakte eble



**otakuoj? E-istoj?
ambaŭ ?**



eĉ ekzistas jam Esperanto manga-oj, ĉu tradukoj, ĉu originaloj.

Eble vi mem ekkonsciigas, leginte ĉi-artikolon, ke vi estas mem Esperantotaku? ;)

Otaku - Fontoj Se vi deziras ekscii pli pri la temo :

• Ĉefa : libro *Otaku Les enfants du virtuel* (J'ai lu, 1999)

- <http://www.barral-office.com/frameindex.html>
- <http://waste.informatik.hu-berlin.de/Grassmuck/Texts/GeschlosseneGesellschaft/1-4-1.html>
- http://www.webotaku.com/pages/japon/dossier.php?id_dossier=15
- <http://perso.wanadoo.fr/bunnymoon/otaku/otaku.htm>
- <http://www.armory.com/tests/anime.html>
- <http://wicca.skynetblogs.be/?date=20040430&number=1&unit=months> (en Eo!)

• FILMOJ

- *Otaku, fils de l'empire du virtuel*, de Jean-Jacques Beinex (1993)
- *Perfect Blue*, de Kon Satoshi (1997)
- *Thomas est amoureux*, de Pierre-Paul Renders
- *Twitch city*, televida serio
- *Extension du domaine de la lutte*, de Philippe Harel
- *Elephant Man*
- *Rain Man* ktp

Koreaj filmoj

Emmanuel Villalta

Kiam oni retrorigardas al la kelkaj jus pasintaj jaroj de la tutmonda kinarto, tuj senteblas ke nova vento blovas el Sud-Koreujo. La koreaj filmoj, dum ĉi-tiu jaroj, fūgis el la porfanatikulaj getaj festivaloj por atingi publikan sukceson, kiel en sia hejmlando, kie ili nun superas la usonajn filmojn. 2004 proponis belan ekzemplaron de ilia bunteco.



Old Boy

La plej sukcesa en festivaloj estis *Old Boy*, de Park Chan-wook : ĝi preskaŭ estus trafinta la Palme d'Or se Tarantino sukcesintus konvinki sian jurion ne doni ĝin al Michael Moore. Kompreneble al Tarantino pli plaĉis la komikseca perforto de *Old Boy* (kie oni manĝas vivantan polpon aux detiras dentojn per martelo....) ol la politika perforto de *Fahrenheit 9/11*. Ankaŭ la malsimpla kaj ne tro realeca rakonto (mallonge : iu viro subite estas kidnapita, restas dum jaroj enslosita sen iu ajn klarigo en ĉambro kun televidilo kiel ununura ligo al la ekstera mondo, kaj post sia same subita liberiĝo penas trovi la kaŭzojn kaj la kulpintojn de sia longjara ekstermondigo) aŭ la cit-aludoj pri la komputilluda kulturo nepre allogis la aŭtoron de *Pulp fiction*.

En la ĉi-jara Cannes-elektio estis ankaŭ *La Femme est l'avenir de l'homme* (Yeojaneun namjaui miraeda), de Hong Sang-soo. Tiu ĉi filmo havas ioman membiografian flankon : ĝi montras Korean filmreĝisoron kiu revenas en sian landon post kelkaj jaroj en Usono (Hong Sang-soo ja ekziliĝis tie dum kelkaj jaroj). Li retrovas

sian antaŭekzilan amikon (kiu iĝis riĉa, edzo kaj patro) kaj ili kune strebas retrovi la knabinon, kiun ili ambaŭ amis kiam ili estis junaj. La filmo disvolviĝas tre flue inter la scenoj de la pasinta kaj de la nuna tempo : la tempo estas io tute ekster la roluloj, ili ĝin ne regas sed nur seniluziige konstatas, ke ili ŝanĝiĝis. Tiun impreson de ŝvebo plej sentigas la scenoj de drinkado : la regisoro vere igis siajn aktorojn drinki, por pli bone kapti la etoson de tiuj unikaj tempoj, eĉ pli senpezaj kaj ekstermondaj ol la aliaj.

Male, la rakonto de *Memories of murder* (Salinui Chueok) de Joon-ho Bong estas forte ligita kun la tempo, kaj kun iu epoko : la fino de la 80aj jaroj, fina jardeko de la sudkorea diktaturo. Ĉirkaŭ malgranda provinca urbeto, virinoj estas perfortigitaj kaj murditaj. La polico tute ne estas alkutimiĝinta al tiaj krimoj, kaj la loka enketisto restas senreaga. Oni do sendas el la ĉefurbo iun fakulo-policiston (kies unua konkludo kompreneble estas « Mi kredas, ke temas pri serimurdanto. »). Do jen perfekta elirpunkto por Hollywood-eca, Seven-eca filmo : du malsamaj sed kompletigaj policistoj, mistera murdanto, pluvegaj noktoj (la krimoj ja okazas nur pluvvetere)... Sed la vivo ne same simplas kiel en Hollywood : la policistoj ne estas superhomoj, kaj la polico unuavice estas la aganta brako de la armea diktaturo : esplortrovi la veron ne estas ĝia ununura celo. Do ne nepre atendu lastminutan malkaŝigon de la vero, ĉar en la vera vivo ankaŭ dubo povas venki.

Alia flanko de la korea historio, multe pli konata ol la armea diktaturo, estas ĝia delonga duonigo. Tion traktas *The coast guard* (Hae anseon) de Kim Ki-duk. En iu izola ĉemara tendaro, milita taĉmento senĉese trejniĝas kaj gvatadas por trafe reagi kiam la Norduloj alvenos (ĉu atake, ĉu spione). Sed nenio okazas, ĝis kiam, iutage, juna gea paro de la apuda vilaĝo venas petolamori en la malpermesita zono. La nerva soldato, kiu ĉi nokte dejoras, tuj pafas kaj mortigas la viro, dum la virino revenas nevundita sed freneziginta al la vilaĝo. Ekde tiam, ĉio iĝas tre komplika : la vilaĝanoj koleras kontraŭ la militistoj, fakte pli danĝeraj ol la eventualaj nordaj spionoj ; la armeo devas ion fari por pruvi ke ĝi estas pli utila ol damaĝa, kaj do punas la pafinton ; la pafinto ne komprenas kial lin oni punis kvankam li plenumis sian mision. Ne dubindas ke tiu vilaĝo-tendaro mondeto iel respegulas la tutan Koreion kaj ĝiajn problemojn, ĝiajn timojn, ĝian paranojon.

